

novan krudmaterialon por teksaĵoj kaj eltrovis ĝin: la ligno! Komenciĝis la epoko de ligna lano kaj ligna silko. Vere, hodiaŭ la kemio eltrovis ankaŭ aliajn artefaritajn teksfadenojn, produktaĵoj de karbo-sablo-kalko, sed la lignan lanon oni uzas nun en grandegaj kvantoj. La nuntempa homaro verŝajne eknudiĝos, se oni ĉesigos la produktadon de ligna lano.

Menciinda estas ankaŭ la produktado de eksplodaĵoj, kies bazmaterialo estas la ligno. Kompreneble, la statistiko ne penetris en milit-fabrikejoj kaj la mondo ne scias kiom da milionoj da tunoj da bona kvalita ligno estas uzata por preparo de eksplodaĵoj.

La homa gento ja povus bonege vivi sen tiaspeca produkto. Ni esperas, ke la popoloj frue aŭ malfrue ĉesigos ĝin - oni ŝparos amasegojn da ligno!

Ĉu ni povus trarigardi la tutan multflankan uzadon de ligno? Estus malfacile, ĉar nun, laŭ la asertoj de statistikemuloj, oni produktas pli ol 20 000 objektojn el ligno. Ili ĉiuj, escepte de la eksplodaĵoj, estas necesaj al la homo. Taŭgan lignon por ĉiuj lignonecesaĵoj oni ĉerpas nun ĝenerale el la arbaroj en Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Sed ili ja estas elĉerpeblaj, ĉar jam de jarcentoj oni detruas la naturan ekvilibron en ili.

Jen kial la alvoko: „Ni protektu la arbarojn kaj racie utiligu ilin” jam fariĝas grava kaj aktuala. La ligno-problemo fariĝas vere internacia kaj eniras la rondon de la aktualaj demandoj de tutmonda ekonomio.

413.1(042)

ENKONDUKO EN LA INTERNACIAN SEMANTIKON

de Marjorie BOULTON

Prelego en Internacia Somera Universitato, Marsejlo, 1957

Homaj gefratoj!

Hodiaŭ mi povos nur enkonduki tre malfacilan kaj gravan temon. Semantiko, laŭ la scienca difino, estas: „la scienco, studanta la vortojn konsidere al ilia signifo.” Kiel scienco, ĝi estas tre juna. Dum jarcentoj, inteligentaj homoj sciis ja ke vortoj ne estas perfektaj komunikiloj. Ekzemple, la filozofia enketmetodo de Sokrato tre insistis pri la malfacileco de difinado, almenaŭ difinado de abstraktaj konceptoj. Dum jarcentoj, poetoj kaj mistikuloj, teologoj kaj amantoj, plendadis pri la neadekvateco de iu ajn homa lingvo por esprimi siajn sentojn. Konata parto de la dramo *Tamburlaine (Tamerlano)* de la anglo, Christopher Marlowe, jam en la deksepa jarcento prezentas al ni tipan specimenon de tiu tre ofta sinteno. Tie ĉi, reĝo parolas pri sia amatino:

„Se ĉiuj plumoj de poetoj ĉiuj
perus iliajn sentojn kaj meditojn,
se ĉiu dolĉo, kiu noblateme
inspiris korojn, pensojn kaj animojn,
se ĉiuj kvintesencoj distilitaj
el floroj de senmorta poezio,
en kiuj kvintesencoj ni perceptas
spegule, la plej altan homan scion, -
se ĉiuj kunfandiĝos en poemon
solan, por bildi la esencan belon,
ankoraŭ ŝvebus en iliaj kapoj,
iliaj kapoj daŭre senripozaj,
almenaŭ unu penso, miro, belo,
kiun neniu lerto envortigus!”

Mi suspektas ke, almenaŭ por psikoj iom rafinitaj, granda parto de la sorĉo de niaj amaj karesoj konsistas en tio, ke ili estas, aŭ eble iluzie ŝajnas, pli trafaj, rektaj, perfektaj komunikiloj ol niaj vortoj.

Ni ĉiuj tre bezonas difinojn, ofte pli ol ni mem konscias. Semantiko estas grava, dolora, danĝera, eĉ foje tragika problemo por multaj kiuj neniam ajn aŭdis la vorton *semantiko*. Ni ĉiuj scias, ke pasintece homoj sangigis aŭ bruligis aliajn homojn pro aferoj de teologiaj terminoj. Nuntempe ni ne estas multe pli civilizitaj; homoj povas torturi aŭ mortigi aliajn, kaj eĉ sub mildaj reĝimoj viktimitigi ilin diversmaniere, pro malkonsentoj pri difinoj de terminoj kiel: „demokratio”, „socialismo”, „komunismo”, „libero”, „patriotismo”, „malpatriotismo”, „bona”. Kion signifas la vorto „Kristana”? Oni povus argumenti dum horoj, sed ĝi nepre havas tre malsamajn detalajn signifojn por kataliko kaj por kvakero. „Bela” virino en Britujo estas ne tre grava; ni ofte dietas zorge por eviti grasiĝon; sed en kelkaj orientaj landoj - gasuja graseco estas la unua estetika postulo por virinoj. En malsimilaj medioj vortoj kiel „bona”, „ĉasta”, „klera”, „bonedukita”, „honestata”, „saĝa” povas havi tre malsimilajn signifojn. Ni scias tro bone, ke kelkaj veraj tragedioj en la privata vivo okazas ĉar du bonintencaj homoj nek diras, nek aŭdas laŭ la sama signifo la vortojn „Mi amas vin”. Oni ofte povas eĉ haltigi kreskantajn kverelojn per iu trafa difino; homoj kiuj fakte samopinias povas tre malsimili laŭ la vortoj, kaj inverse. Tiaj aferoj estas aferoj de ĉiutaga homa sperto, ĉu ne?

Do, artistoj kaj simplaj homoj dum jarcentoj konsciis pri la ekzisto de problemoj, kiujn ni povus nomi semantikaj; sed semantiko kiel scienco estas iom pli juna ol Esperanto mem. En la angla lingvo la vorto *semantic* (adjektivo) aperis por la unua fojo nur en 1895, kaj la vorto *semantics* - la substantivo - aperis por la unua fojo nur en 1900. Ni ŝuldas la vorton al eminenta franca poligloto kaj filologo, Michel

Jules Alfred Bréal, 1832-1915, kies „*Essai de sémantique*” (Eseo pri Semantiko), 1897, estis la unua grava verko pri la temo. Angla traduko aperis en 1900. La libro de Bréal estas ege erudicia kaj tre stimula; ĝi konsideras semantikon pli laŭ pure filologia ol laŭ filozofia aŭ psikologia vidpunkto; sed Bréal jam montras, kelkloke, perceptojn pri la psikologia motivado kaj signifo de la semantikaj ŝanĝoj, kiujn li prinotas.

La plej grava ĝisnuna angla libro pri la temo estas libro kun la iom timiga titolo „*The Meaning of Meaning*” (La Signifo de Signifo) de C. K. Ogden kaj I. A. Richards, 1923. Tiu Ogden estas ja la sama kiu ellaboris „*Basic English*” - „Bazan Anglan” - kaj estis rekta malamiko de Esperanto; tamen, la semantikaj esploroj de Ogden kaj Richards estis tiel altnivelaj kaj valoraj, ke mi ofte bedaŭras, ke tiaj intelektoj ne servis prefere al Esperanto! Richards estas inter la plej gravaj nuntempaj anglaj kritikistoj; li verkis diversajn aliajn gravajn librojn pri semantiko kaj literaturo. Alia kritikisto en la sama skolo estas William Empson, konata ankaŭ kiel poeto; li speciale studis ambiguecon, aŭ dubsencecon, rilate al emociaj lingvaĵoj en poezio, en sia brilega „*Seven Types of Ambiguity*” (Sep Tipoj de Dubsenceco) kaj la eĉ pli profunda, sed konsterna malfacila „*The Structure of Complex Words*” (Strukturo de Kompleksaj Vortoj) en kiu li uzas kvazaŭmatematikajn formulojn kaj simbolojn por esprimi semantikajn subtilaĵojn.

La pionira libro de Bréal estas ĉefe filologia; la pionira libro de Richards kaj la libroj de Empson estas ĉefe psikologiaj. La libroj pri tio, kion ni povus eble nomi *psikologio de semantiko*, estas legataj ĉefe en universitatoj, kaj mi iom suspektas ke eĉ en tiaj rondoj ili estas ofte pli admirataj ol komprenataj; ili estas elstare malpopularaj. Tamen, tiu nova klimato de semantika esplorado malrapide filtrigis al pli larĝa publiko. Ekzemple, dum la dua mondmilito tre ŝatata brita radioprogramo, la tielnomita „*Brains Trust*” - kvazaŭ „Intelekta Kooperativo” - publike diskutis diversajn interesajn problemojn laŭ la demandoj de la aŭskultantoj. En tiu programo la konata brita populara filozofo C. E. M. Joat alkiutimigis la aŭskultantojn al la frazo „*It depends what you mean*”, proksimume, „La respondo dependas de la signifo” Tiu ĉi frazo poste iĝis la titolo de ŝatata dramo de James Bridie, kaj, poste, duonluda slogano por multaj. Semantikaj studoj estas do, iasence, parto de la nuna intelekta klimato en Britujo.

La jena ŝlosila frazo el „*The Meaning of Meaning*” klare difinas la neceson de semantiko:

„*Normale, kiam ajn ni aŭdas ion diritan, ni tuj saltas al la konkludo, ke la parolanto aludas tion, kion ni aludus, se ni mem dirus la vortojn.*”

„Nu, kompreneble! Tio estas la fundamento de komunikado!” ni unue reagis, eble; sed ni ne bezonas longe aŭ profunde pripensi tiun aserton,

por konstati, ke tiu konkludo estas ofte falsa. Eĉ en la nacia lingvo kaj inter samnacionoj, semantiko havas problemojn por ordinaraĵoj homoj. Kiuj estas la plej oftaj kaŭzoj de tiaj miskomprenoj?

Unue, homo povas miskompreni pro simpla nescio de la vorto. Sed, se li nur scias ke li ne scias, li povas uzi vortaron. Pli danĝera estas maladekvata scio aŭ maladekvata difino, ĉar pri tio ni ofte ne scias, ke nia scio maladekvatas. Ekzemple, por multaj homoj „*komunista*” sinonimas kun „*rusa*”; „*virto*” estas nur „*virgeco*”; „*bona*” signifas „*samekleziana kiel mi*”; kaj kuracistoj, instruistoj, juristoj, dommastrinoj kaj prelegantoj en Internacia Somera Universitato nepre ne faras „*laboron*”. Videble tiuj homoj bezonas pli zorgan difinon de „*komunista*”, „*virto*”, „*bona*” kaj „*laboro*”!

Due, homoj ofte konfuzas vortojn iom similajn, eĉ en la nacia lingvo. Mi aŭdis erarojn kiujn mi povus esperantigi jene: „Sur la tombon de mia bopatrino mi devos meti taŭgan *epiteton*”. „Muzulmanoj estas *ĉirkaŭskribitaj* (cirkumciditaj!)” Tamen, tiaj semantikaj eraroj, kiuj havas la meriton ke ili ridigas, malofte faras gravan malbonon. Ordinara vortaro povas tuj korekti ilin.

La asocioj kiuj ligas sin al la vortoj multe pli gravas. Voĉtono per si mem povas krei tutan asoci-strukturon en la menso. Ekzemple, se mi ĉiam dirus „*Akademiano*” per malalta, sekretema voĉo, mi baldaŭ kredigus al multaj el vi ke niaj lingvaj eminentuloj praktikas nemencieblajn ritojn en siaj privataj kunsidoj - tute sen diri ion ajn kalumnian! Voĉtono ironia, naŭzita, ŝokita, sarkasma, respektema, ekstaza aŭ sekretema povas tute ŝanĝi la signifon de vorto.

Pli grave, la asocio-sistemo kiu kristaliĝas dum la vivo ĉirkaŭ ĉiu vorto povas tre malsimili laŭ la medio de la individuo. Ekzemple, en malriĉa hejmo la vortoj: „*Li havas aŭtomobilon*”, sugestas vivnivelon tute neatingeblan, reve sopiratan, kaj enhavas iun nuancon de envio aŭ admiro. En pli riĉa hejmo ĝi estas nur simpla informa frazo sen emocia koloro. Kaj eble en kelkaj medioj en kiujn mi neniam penetristia frazo povus eĉ sugesti malestimon aŭ ĝenitan kompaton al tiu malriĉulo kiu tiel mizere vivas, ke li posedas nur unu aŭtomobilon, kaj nek aviadilon nek jahton. „*Pastro*” havas tre malsimilajn asocio-strukturojn en la mensoj de katolikoj, metodistoj, budhanoj kaj ateistoj. En kelkaj medioj, almenaŭ en mia lando, „*malmorala*” havas nur unu signifon - „*ĝuinta eksteredzecajn seksrilatojn*”, kaj neniam aludas pri komercaj friponaĵoj, krueleco aŭ intenca intelekta malhonesteco. Ni ĉiuj scias ke la vorto „*burĝa*” tre varias semantike laŭ la politika aŭ ekonomia skolo kies teoriojn ni aprobas. Tiaj malsimiloj povas eĉ tre gravi.

En nacia lingvo, do, serioza atento al semantiko estas parto de intelekta honesteco. Ĝi estas grava parto de la uzado de vortoj, ne kiel nur societa murmurado, ŝirmilo kontraŭ homa soleco, sed kiel veraĵ

komunikiloj. Laŭ mia opinio kelkaj el la ĉefaj malhelpoj al semantika honesteco, escepte tiun homan stultecon kiu ŝajne estas nepra kaj radikala malfeliĉo de la homaro, estas la jenaj:

1. Kutimoj de senzorga skribado aŭ parolado, kvazaŭ vortoj ne gravus. Ĉefe pro tio, la lingvaj disciplinoj havas valoron. Kliŝplena stilo ofte indikas menson semantike tre malhonestan, kvankam, plej ofte, senintence malhonestan.

2. Ordinaraĵoj. Modernaj ĵurnaloj estas kutime tro rapide skribitaj, kaj kutime enhavas intencajn modifojn de la vero pro propagandaj aŭ reklamaj celoj - ni ne forgesu ke en multaj landoj la registaro regas la ĵurnalaron, kaj en multaj aliaj landoj la reklamantoj pagas grandan parton de la kosto; eĉ kie ĵurnalistoj ĝuas teoriantliberon, ĵurnaloj estas kutime tendencaj. Verkistoj sub tiaj premoj ofte intence troampleksigas aŭ tromallarĝigas la signifon de vortoj.

3. Modernaj metodoj de reklamado kaj propagando, kiuj kutime estas ege malhonestaj semantike. Tre simpla ekzemplo: „La sapo de Blankman estas la plej bona!” aperas sur la sama paĝo kiel „La plej bona sapo estas la sapo de Purkol!” Kiam la publiko vidas du tiajn dirojn, kiuj absolute ne povas ambaŭ esti veraj asertoj, la signifo de la vortoj „Plej bona” malfortiĝas ĝis finfine tiuj vortoj, kaj multaj similaj laŭdvortoj, perdas ĉiun signifon. Politikaj laŭdoj kaj mallaŭdoj ankaŭ forigas la signifon de vortoj, eĉ ĝis la punkto kie homoj almenaŭ inklinaj al honesteco diras ke ĉiuj politikistoj estas friponoj kaj ili mem detruas demokration, lasante ĉion al la friponoj!

4. Eŭfemismoj, aŭ, malpli ofte, la malo. Multaj vortoj perdas la ĝustan signifon ĉar oni uzas ilin en elegantaj, delikataj parafrazoj por iu biologia aŭ alia fenomeno kiun ni hezitas rekte mencii, pro prudeco aŭ eble vere estetika motivo. Estas bone ke en Esperanto ni havas la decan vorton „*necesejo*”, kiu estas neŭtrala kaj samtempe ne malsane pruda. En la angla la klopodo eviti rektan mencion de tiu ja necesa loko malbeligis por ni multajn aliajn esprimojn, ekzemple, „*lav-ejo*”, „*banĉambro*”, „*puĉri la nazon*”, „*lavi la manojn*” kaj eĉ „*elspezi pencon*”! Oni devas ĉiam trovi novan eŭfemismon por anstataŭi vorton kiu jam iĝis kvazaŭ maldeca. Kontraŭe, la reaga deziro ŝoki prudulojn, la ribelo kontraŭ troa eŭfemismemo, povas kaŭzi konfuzojn, forigante kelkajn nuancojn de emocia intenseco.

5. Cenzurado ĉiuspeca. Tuj kiam homoj, scias, ke ili povas suferi pro siaj opinioj, ili komencas uzi kaŝesprimojn kaj malprecizajn esprimojn pro timo. Mia lando estas inter la plej liberaj, pri opinioj, en la mondo, sed eĉ tie mi ne kuraĝas publike diri kelkajn miajn verajn opiniojn, kaj uzas metaforojn, simbolojn, kaj aliajn kaŝesprimojn kiuj, espereble, estos komprenataj de simpatiantoj kaj ne de miaj malamikoj. En multaj landoj cenzurado estas tia, ke oni eĉ ektimas zorge aŭ honesteme pensi. Ju pli oni punas neortodoksajn opiniojn, des pli oni riskas

gravajn degenerojn semantikajn. La malfacilo diri la veron estas ĉiam sufiĉe granda; aldonita timo kaj troprudento preskaŭ malebligas la diron de iu ajn aŭtentika vero, escepte por herooj.

La semantika problemoj pri metaforoj kaj analogoj estas tre komplikaj, kaj bezonus apartan prelegon; poetoj, oratoroj, filozofoj, teologoj, politikistoj kaj eĉ sciencistoj uzas ilin ofte. Ili povas uzi ilin por komuniki pensojn nedireblajn per simplaj logikaj asertoj, aŭ por utiligi tiujn ofte valorajn mensajn procezojn kiuj ne estas logikaj; kaj tia uzado povas esti tute honesta; povas esti eĉ la sola rimedo por esprimi kelkajn konceptojn. Tamen, ĉiuj homoj, precipe politikistoj kaj filozofoj, povas ankaŭ malhoneste uzi tiajn tropojn - kaj eĉ senintence trompi sin mem.

Videble, eĉ en naciaj lingvoj la semantika problemoj estas grava. Tuj kiam ni eklernas fremdan lingvon semantikaj eraroj minacas nin eĉ pli. En lingvo kiu estas destinita al internacia uzado la eblo de semantikaj eraroj konsternas vastiĝas; sed ankaŭ internacia lingvo prezentas al ni por la unua fojo la eblon de vere internacia semantiko.

Ni ĉiuj inklinas kredi ke la sama radikoj havas la saman signifon en alia lingvo. Kiam mi por la unua fojo vidis la italan esprimon *un colletto morbido (mola kolumo)* mi emis pensi ke italaj kolumoj devas esti pli inteligentaj kaj konsciaj ol la niaj, ĉar en la angla *morbidity* signifas ne *mola*, sed *malsane introspektiva*, aŭ *tro inklinata pripensi malagrablajn temojn*. Angloj kiuj studas la francan ofte erare kredas ke *blessed*, simile al la angla *bless*, signifas *beni*, dum efektive ĝi signifas *vundi*, aŭ ke *chair* signifas ne *karno*, sed *seĝo*, ĉar la ortografio samas en la du lingvoj; Svedo, en kies lingvo *apa* signifas *simio*, sendube iom ŝokiĝus se li ekstudus la hungaran kaj trovus ke por hungaro *apa* estas *patro*! Kiam hungaraj rifuĝintoj vizitis la kolezion en kiu mi laboras, oni volis instrui ilin pri la anglaj nomoj de diversaj objektoj en la halo. „*Chalk!*” diris studentino, montrante peceton da kreto, kaj ŝi miris pri la rideksplodo; *csók* hungare signifas - *kiso*!

En Esperanto, diversnecianoj emas erari pri radikoj kiuj similas forme sed ne semantike en Esperanto kaj la nacia lingvo. Angloj eraras pri *oferi*, kiu similas al la angla *offer* (simple *proponi*), kaj hispanoj same. Eble italoj simile kredas komence ke *kadro* signifas *bildon*, pro la itala *quadro*, aŭ rusoj ke *korko* signifas *ŝelo* pro la rusa *korka*. Svedaj komencantoj estas turmentataj de la pronomoj, ĉar la sveda *vi* estas la esperanta *ni* kaj inverse. Diversnecianoj regas nin per amuza sortimento de eraroj pri *kapo*, *ĉapo*, *ĉapelo* kaj *kapelo*! Poliglotoj povas erari eĉ pli komplike; mi iam aŭdis tre inteligentan poliglotan kroatinon diri „Mi presos vian robon por vi!” ĉar ŝi konis la anglan *press*, kiu povas signifi *gladi*. En Esperanto mem, sen la helpo - aŭ malhelpo! - de la nacia lingvo, oni povas erari pri similaj vortoj, ekzemple, „La *ananaso*j flugis super mia kapo”.

Tiaj eraroj estas korekteblaj per la *Plena Vortaro* aŭ nacilingva-esperanta aŭ nacilingva-alinacilingva vortaro. Multe pli malfacila en internacia semantiko estas la normigo de emociaj asoci-strukturoj. Vi trovos amuzan ekzemplon en „*Koko Krias Jam!*” de mia estimata kolego Ferenc Szilágyi; legu la historion „*Konciza Koresponda Kurso pri Amo.*” Tie li rakontas, kiel li eraris, uzante la verbon *ami* laŭ la hungara senco inter svedinoj, kiuj komprenis ĝin laŭ la sveda senco, multe pli drasta! Poste, tiu kompatinda hungaro skribis al edziniĝinta britino kaj uzis la tiam konvencian hungaran formulon por letero al iu ajn ŝatata persono: „Kun vera amo mi kisas viajn manojn.” Brita edzo povus interpreti tian frazon nur forte erotike!

La sciencaj semantikistoj kiel Richards pretendas, ke ili volas helpi la homaron al tiel bonaj difinoj, ke „*amo*”, „*bono*”, „*demokratio*”, „*virto*” kaj tiel plu estos same klaraj unusencaj vortoj kiel la ĉiutagaj vortoj por konkretaj objektoj, ekzemple *krajono*, *nazo*, *pomo*, *lampo*, *viando*. Sed sur la kampo de internacia semantiko oni ne povas garantii ke eĉ la plej ĉiutagaj konkretaj objektoj portos la saman asocio-strukturon en ĉiuj landoj. Ekzemple: en kelkaj landoj *banano* estas frukto luksa, manĝata nur dum festoj; en kelkaj aliaj landoj, kie bananoj kreskas, ĝi estas tiel malkara kaj ĉiutaga manĝo kiel *pano* por franco aŭ germano. La vortoj *ruĝa vino*, kiuj al franco sugestas nur banalan trinkaĵon, sugestas al la plimulto de la angloj riĉecon kaj iom luksan, eĉ diboĉan medion. *Viando* en la pli granda parto de Eŭropo, eĉ pli en Usono kaj Argentino, estas vorto sen emocia intereso, escepte eble por vegetaranoj; sed por multaj afrikanoj kaj ĉinoj ĝi estas vorto forte ŝarĝita per ideoj de festenado, lukso, privilegio, kaj en parto de Afriko eĉ magio. Mi ie legis, ekzemple, pri afrika negro kiu, kiam misiisto provis klarigi al li pri la potenco de la reĝino Viktorino, diris, „Ĉu ŝi eble povos eĉ ĉiutage manĝi viandon el skatolo?”

La vorto *kiso* portos multe pli da emocia, eĉ da ŝoka, efiko en lando kie kisoj estas iom tabuaj agoj, ol en landoj kie ili estas kutimaj salutoj, kaj denove alian signifon ĉe primitivuloj - ŝajne kelkaj tiaj triboj eĉ nun restas - kiuj ankoraŭ ne eltrovis tiun frandaĵon. Sendube la vorto *nuda* havos malsimilajn asoci-strukturojn por hispano, en kies lando oni devas tre zorge kovri sin por aperi publike, svedo, en kies lando oni ŝajne havas tre objektivan sintenon pri nudeco, kaj homo el kelkaj partoj de la malproksima oriento aŭ Afriko, kie oni kutimas tute senĝene promeni nuda simple ĉar oni ne havas vestaĵojn. La viv-nivelo, kutimoj, klimatoj kaj moroj de diversaj landoj influos la semantikon.

Ankaŭ multaj bestoj, floroj, ceremonioj, klimataj fenomenoj kaj moroj estas al kelkaj landoj indiĝenaj, al kelkaj ekzotikaj. *Sario*, *kareo*, *nirvano*, *karmo*, estas kvazaŭ ĉiutagaj vortoj por hinda Esperantisto, sed por norvega Esperantisto ili enhavos la strangecon de tute

fremda vivostilo. Ni pensu eĉ pri vortoj kiuj sugestas distancon. En Britujo *Timbuktu* esprimas kvazaŭ la lastan ekstremon de malproksimeco. Sed se ano de tiu urbo legus tradukitan anglan romanon kaj trovus la vortojn: „Li ne estus pli senutila al mi, se li loĝus en *Timbuktu*” li apenaŭ povus vere senti la emocian guston de tiu frazo, kvankam per normala imagopova inteligenteco li povus kompreni la ideon. Anglo diras pri io nekomprenata „Tio estas al mi grekaĵo!” - kion tio povas signifi por greko?

Ni vidas la efikon de la medio sur la lingvaĵon en proverboj. Ni ĉiuj volas foje esprimi la ideon: „Li havas neordinaran bonŝancon.” Kiel diras la *Proverbaro Esperanta*: „Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn.” La germanoj havas iom similan esprimon: „Liaj kokinoj demetas ovojn kun du flavaĵoj.” La hebreoj diras: „Se bonŝanco estas via, eĉ via virbovo naskos bovidon.” Sed la araboj ŝajne diras, por esprimi esence similan koncepton: „Ĵetu lin en Nilon, kaj li reaperos kun fiŝo en la buŝo!” kaj la hispanoj, kiuj ofte manĝas tre simple, diras „Lia pano falis en la mielon.” La *Proverbaro* donas al la mondo: „Vortoj sakon ne plenigas!” kaj „Plendoj stomakon ne plenigas.” Sed la ĉinoj, kies plej grava manĝaĵo estas rizo, diras „Parolado ne kuiras la rizon!” dum la britoj, kiuj ofte manĝas legomojn kun iom da butero, diras, „Belaj vortoj ne buteras pastinakojn!”

Sed la plej danĝeraj semantikaj konfuzoj okazas ne pri tiaj konkretaj vortoj. Abstraktaĵoj estas pli komplikaj kaj malpli facile klarigeblaj. Ekzemple, se mi dirus al inteligenta ĉino: „Mi devas labori por gajni mian buterpanon” kaj li ne komprenus, mi povus tuj komprenigi lin - parafrazante: „Mi devas labori por ricevi necesan enspezon - kvazaŭ por gajni mian rizon!” Ruso parolante kun usonano povus facile ekkompreni ke por ĉiu el ili *forno* havas iom malsimilan signifon; sed la ruso treege malfacile komprenus ke por la usonano „*bona komunisto*” efikas kiel aŭdaca paradokso. Kaj la difino en „*Mateo Falcone*” de Merimée, laŭ la traduko de Borel: „Li vivis noble, kio signifas, farante nenion”, plaĉus nek al la rusoj, nek al la usonano!

Iam mi - lektorino en seminario - diris al amikino kies hejmo estas en lando ege suferinta dum la historio: „Mi deziras ĉiam liberigi miajn studentinojn.” Ŝi iom levis la brovojn, kvankam mi jam sciis ke ŝi aprobas mian pedagogian sintenon. Iom poste, sukerkovrita kuko kiun mi lasis en mia ĉambro mistere malaperis. Vidante ke mi serĉas ĝin, mia amikino diris kun amareta rideto: „Mi liberigis ĝin!” Tiu uzo de la vorto estis, historie, tre interese kaj iom dolore klariga. Ni trovas ke *libero*, *demokratio*, *militema*, *pacama*, *faŝisto*, *kristana*, *socialista*, *kultura*, *popola*, *justa*, havas tre malsimilajn signifojn en diversaj landoj aŭ en diversaj medioj. Jen ekzemplo kiu ne povas ofendi: en komunistaj landoj *komunismo* kaj *socialismo* estas preskaŭ sinonimoj; sed en multaj aliaj landoj *socialismo* signifas la specon de socialismo tro-

vitan en la diversaj partioj ofte nomataj „socialdemokrataj” kaj oni tre forte distingas ilin de la *komunistaj* partioj. Ni tro bone scias ke je la nomo de Kristo homoj ofte faris - eĉ hodiaŭ foje faras - teruraĵojn tre klare malaprobatajn de Kristo mem; je la nomo de Libero homoj ofte malliberigis aliajn tre maljuste, ekzemple dum la teroro de la Franca Revolucio, kaj pli malfrue. Tiaj semantikaj konfuzoj povas tre helpi en aĉaj propagandaj bataloj, sed tre malhelpi al internacia harmonio kaj racia modereco.

Metaforoj kaj analogoj ankaŭ tre malsimilas en diversaj landoj. „*Hundo*”, la tipo de fideleco kaj servemo en Britujo, estas por multaj hindoj preskaŭ tabue malpura kaj aĉa. La asocio-strukturo metafora ĉirkaŭ *maro* tre malsimilas por greko, italo aŭ dano, kiuj kutime bone konas la maron, por hungaro aŭ sviso, kiu vidas ĝin nur tre malofte, ĉiam eksterlande, kaj por nederlandano, kiu konas ĝin kiel samtempamikon kaj danĝeran malamikon. „*Nigra*” havas malsimilajn metaforajn nuancojn por nacioj kun aŭ sen rasaj problemoj. „*Kuniklo*” sugestas ion ĉarman en Britujo, sed probable ne en Aŭstralio, kie la besto estas grava minaco por la terkulturo. „*Suno*” estas metaforo de ĝojo en la malvarmaj nordaj landoj, kaj de timo kaj tiraneco en kelkaj varmegaj tropikaj landoj. Parenteze, eble estos interese memori, ke en kelkaj varmaj landoj la infero estas bildigita kiel varmega, sed en kelkaj malvarmaj landoj kiel malvarmega.

Nu, ni aldonu kelkajn dubsencajn metaforojn kaj aludojn al kelkaj dubsencaj abstraktaĵoj en politika parolado, kaj jen la scenejo preta por nova nervostreĉo, nova kverelo, nova propagandmilito kaj eble danĝero al loka aŭ monda paco Eĉ en privata konversacio kiu komenciĝas amike, tiaj kombinaĵoj povas kaŭzi kverelojn.

Tiom da gravaj semantikaj problemoj eble timigos nin. Sed ni vivas sub la sankta signo de l'Espero, kaj mi kredas ke Esperanto donas al la homaro tute novan semantikan eblon. Ni povos, en Esperanto, krei lingvon kiu estos pli normigita, por la tuta homaro, ol iu ajn nacia lingvo, se ni volos tion fari. Kial?

Unue, ĉar homoj el multaj nacioj povas renkontiĝi por pridiskuti la signifon de la Esperantaj vortoj, kaj oni povas krei difinojn el la scio kaj sperto de multaj tiaj homoj. Foje okazos, ke ne ĉiuj povos konsenti pri la signifo de vorto; sed en tiaj kazoj oni povos indiki en vortaroj ke semantikaj problemoj ekzistas pri la vorto. Tio komenciĝis bonege en la *Plena Vortaro*, sed iam ni bezonos ion multe pli grandan, ne nur por enmeti necesajn novajn vortojn, sed, pli grave, por pli amplekse pritrakti la signifon de malnovaj. Ne nur komitatoj kiuj zorgas pri vortaroj pridiskutos tiajn aferojn; la plej simplaj homoj, en leteroj kaj konversacioj, povos celi adekvatajn difinojn kaj zorgi pri la lingvouzo. Finfine, pere de Esperanto, diverslandaj homoj povos diskuti tiajn te-

mojn multe pli amike ol kutime, kaj sen tradukaj ĝenoj.

Due, Esperanto finfine havos pli ampleksan vortaron ol iu ajn nacia lingvo. Ĝi ĉiam restos multe pli facile lernebla, pro la simpla gramatiko, la sistemo de afiksoj, la internacieco de radikoj kaj la granda fleksebleco; ankaŭ, neniu ajn bezonos la tutan vortprovizon, ĉar, kiel en nacia lingvo, ĉiu uzos nur la vortojn kiujn li bezonos, kaj legos nur la librojn kiuj interesos lin profesie aŭ distre. Sed finfine ni devos havi vortojn, kiuj esprimos ĉiujn konceptojn troveblajn en ĉiuj naciaj civilizaj lingvoj. Tia evoluo jam komenciĝis: ekzemple, la esperanta vortprovizo jam inkluzivas la jenajn vortojn, kiuj, en multaj naciaj lingvoj, estas ankoraŭ tute ekzotikaj vortoj kiujn oni presas per kursivaj literoj: *sario, samovaro, iredenta, rikiŝo, burnuso, bifsteko, kepo, kermeso, poldero, obio, kolhozo, hemiono* k.t.p. Ĉar Esperanto estas iom pli ol lingvo; ĝi estas altnivela kulturo kiu per si mem pligrandigas nian konon kaj komprenon pri la mondo.

Trie, la Esperantistoj almenaŭ pli deziras homan interkomprenon kaj pli konscias lingvajn problemojn ol la plimulto de la neesperantista homaro; la idealisma forto en la Movado restas grava; kaj tial oni povas racie esperi, ke semantikaj problemoj estos al la Esperantistaro interesaj kaj ke ni povos pritrakti ilin honeste, aŭ almenaŭ honesteme - ĉar, por atingi veron, la manko de mensogemo bedaŭrinde ne sufiĉas. Kvankam inter Esperantistoj maltoleremo kaj ŝovinismo ja povas ekzisti, tamen la ĝenerala nivelo de toleremo kaj komprenemo estas modere alta; kaj tio tre helpas al racia, moderspirita, trankvila laborado pri difinoj.

Vortaristoj povas multon fari; sed seriozaj verkistoj ankaŭ estas gravaj, kaj, kvankam mi ne pretendas esti plene objektiva, mi opinias ke poetoj povas multe kontribui al semantiko, same kiel ili kutime kontribuas al la evoluo de lingvoj. Ĉar bonaj poetoj ĉiam tre konscias pri la lukto kun vortoj, la longa penado uzi vortojn kun perfekte preciza signifo kaj diri tion, kion la poeto vere volas diri. Aliaj homoj, jes, kaj ni poetoj mem en la ĉiutaga rutino, povas, eĉ devas, ofte eligi nur societajn murmurojn stereotipajn kaj sensignifajn. Neprecizaj vortoj estas uzitaj por la neprecizaj, rapidaj pensoj de tiaj societaj rutinoj. Sed la sincera kaj konscia poeto, kiu arde kaj sindoneme luktas, tra doloroj kiujn nur la poeto mem konas, provante precizigi siajn vortojn, estas grava servanto de la semantika aspekto de tiu malromantika sed ege bezonata virto, intelekta honesteco. Poetoj freŝigas la vortojn, vigligas ilin, donas al ili perditan forton. Mi deziregas, ke oni ne malhelpu la poetojn en ilia tre malfacila tasko per stulta cenzurado, serĉado de citindaj propagandaĵoj kaj polemikaĵoj, aŭ insistado pri iu mallarĝa tema aŭ krea kriterio: ĉiuj tiaj kriterioj estas esence kontraŭpoeziaj kaj malhelpas la poetojn.

Sed vortaristoj kaj poetoj estas nur la avangardo en nia paca batalo. Ĉiuj Esperantistoj evoluigas nian lingvon, jam tiel esprimovan, jam tiel estetike plaĉan, en tiu direkto de semantika rafiniteco kaj honesteco. Esperanto estas videble tre taŭga ilo por reklamado kaj propagando. Mallarĝmensaj propagandistoj, kiuj celas nur konvinki sen atenti la etikon de la metodo, jam degenerigis preskaŭ ĉiujn naciajn lingvojn, uzante ilin en publikaj verkoj senrespondece kaj sloganece. Ni zorgu ke, kiom ajn fortaj estas niaj opinioj, ni ne tiel misuzu Esperanton. Pro la speciala etoso de la Movado, la lingvo restas pli lingvo de sinceruloj ol iu ajn nacia lingvo. Ĝi restu tia! Kaj ĉiu Esperantisto povas helpi.

Belaj, kortuŝaj, sanktaj al ni ĉiuj estas tiuj vortoj: amo, homfrateco, interkompreniĝo, paco. Sanktaj estas tiuj emociaj signoj en Universala Kongreso: tiuj larmoj en la okuloj, tiuj impulsaj manpremoj kun eksmalamikoj, tiu rifuzo akcepti la artfaritajn malamojn de niaj registaroj; sanktaj estas la kisoj kaj la kantoj, la flago brodita per diversaj urbonomoj, tiu stelo de Espero, printempkolora, kiu brilas ne nur sur niaj brustoj, sed en niaj koroj. Sed tiuj noblaj kaj dolĉaj emocioj ne povas plene interfratigi la suferantan homaron; vera kompreno estas io pli komplika ol obtuza ĝenerala pardonemo; ĝi postulas seriozan atenton al la signifo de vortoj. Internacia semantiko estas ankoraŭ preskaŭ novnaskita; mi ne povas profeti la detalojn de ĝia evoluo; sed mi certas ke la ebloj sur tiu kampo estas grandegaj. Sankta, malfacila, belega estas tiu lukto en la individua koro por venki antaŭjuĝojn, doni veran homfratan amon, senkondiĉan aman amon; sed eble same valora kaj progresiga estas tiu lukto en la individua intelekto por serĉi la veran veron.

31 : 42/49 : 3-05

LA PLEJ MULTE PAROLATAJ LINGVOJ

far Prof. D-ro Sidney S. CULBERT

La tabelo kunaperanta listigas la lingvojn de la mondo kiuj estas parolataj de almenaŭ unu miliono da personoj. La nombro indikas, per la plej proksima miliono, kiom da personoj parolas la koncernan lingvon. La taksoj, bazitaj sur la plej freŝdataj fontoj, rilatas la situacion je jarmezio, 1957. Nombro interkrampa tuj post la nomo lingva direktas al noto same numerita. Kursive presitaj vortoj ne estas Esperantaj, kvankam pluraj, ekzemple „madura”, „makua”, „ngala”, „njanĝa”, „orija”, kaj „ruanda”, estas senŝanĝe Esperantigindaj.

Afgana	11	Guzerata (Hinduĵo)	20
Afrikansa	4	Gvarana (plejparte	
Albana	2	Paragvajo)	2
Amhara (Etiopio)	8	Hakka ⁴⁾ (Ĥinuĵo)	19
Anama (Vietnamo, Azio) ...	23	Hausa (Afriko okcidenta kaj	
<i>Andhra</i> (aŭ <i>Telugu</i> , kiun		centra)	13
vidu)		Hebrea (plejparte Izraelo) ...	2
Angla	275	Hinda ¹⁾ ⁵⁾ (Nepre vidu la no-	
Araba	74	ton)	146
Armena	4	Hindustana ⁵⁾	
Asama ¹⁾ (Hinduĵo)	7	Hispana	139
Azerbajĝana (Sovetunio;		Hungara (aŭ Madjara)	12
Irano)	5	Ĥina ⁶⁾	
Balia (Indonezio)	4	<i>Ibibio-Efik</i> (Afriko okciden-	
Baluĥa (Irano; Pakistano) ..	2	ta)	1
Baŝkira (Sovetunio)	1	<i>Igbo</i> (aŭ <i>Ibo</i>) (Afriko okci-	
Bataka (Indonezio)	1	denta)	4
Bengala ¹⁾ (Pakistano; Hin-		<i>Iloko</i> (Filipinoj)	2
duĵo)	77	Indonezia (Nacia lingvo bazi-	
Berbera ²⁾ (Afriko norda)		ta sur malaja, kiun vidu) ...	
Birma	14	Itala	57
Blankrusa (plejparte Sovet-		Japana	95
unio)	10	Java	42
Buginesa ³⁾ (Indonezio) ...	1	Jida ⁷⁾	
Bulgara	7	<i>Joruba</i> (Afriko okcidenta) ...	4
Ĉeĥa (Ĉeĥoslovakujo)	9	Kajzaka (Sovetunio)	4
Ĉuvaŝa (Sovetunio)	1	Kamboĝa (Azio)	3
<i>Dajak</i> (Borneo)	1	Kanara ¹⁾ (Hinduĵo)	19
Dana	5	Kantona (Ĥinuĵo)	43
Esperanta	1	Kartvela (aŭ Georga)	
Estona	1	(Sovetunio)	1
Evea (Afriko okcidenta)	1	Kaŝmira ¹⁾	2
Finna	4	<i>Kerala</i> (aŭ <i>Malajalam</i> kiun	
Flandra (formo de Nederlan-		vidu)	
da kiun vidu)		<i>Kherĉari</i> (Hinduĵo)	3
Franca	70	Kiĉŭa (Ameriko suda)	6
<i>Fulani</i> (Afriko okcidenta) ...	6	<i>Kikuju</i> (aŭ <i>Gikuju</i>) (Kenjo,	
Galica (Hispanujo)	2	Afriko)	1
<i>Galla</i> (Etiopio)	3	Kirgiza (Sovetunio)	1
<i>Ganda</i> (aŭ <i>Luganda</i>) (suda		Korea	32
Ugando, Afriko)	2	Kurda (Turkuĵo, Irano, Ira-	
Germana	120	ko, Sovetunio, Sirio)	5
Gonda (Hinduĵo)	1	Laosa (Azio)	1
Greka	8	Latva	2